

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 12-an de septembro 2013 per Skype.

(Protokolo aprobota la 10-an de oktobro 2013.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Hilde Iren L. Bye en Trondheim
Ulf Lunde en Os
Mario Machlik en Tromsø
Amelie Matt en Alta
Herman Ranæs en Trondheim

0. Tagordo

Aprobata.

1. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 38 405,- Skagen Høyrente kr 63 645,-
La kasisto starigos altinterezan konton ĉe la banko DNB-Nor kaj administros ĝin.

2. Proceduroj je aliĝoj

La sekretario pretigos proponon pri bonveniga letero ĝis la venonta estrarkunveno. La estraro kontrolis la adresojn al kiuj venos informo pri membriĝo farita pere de la formularo en nia hejmpaĝo.

3. Bontenado

La Landa Kunveno decidis starigi novan postenon, bonteniston (prizorganton) de Esperantonia kaj elektis Cato Haugen por tiu tasko. La estraro jam ricevis raporton de li pri lia laboro. Herman Ranæs telefone parolos kun li pri eventualaj farendajoj kaj planoj. Ni esperas, ke oni sukcesos trovi luantojn de la kunvenĉambro.

4. Mia Muziko por Paco

La prezidento ricevis retpoŝton el Pollando pri kunlaboro en festivalo. La limdato jam estis tro proksima kaj ni ne havis eblecon pritaksi la aferon. La prezidento sendis respondon.

5. Komitatano A

Ni reelektis Torstein Kvakland kiel komitatano A por la periodo 2013-2017 en UEA.

6. Nova reprezentanto de NEL en estraro de legaco Uhlen

Arne Olav Mjøen petis anstataŭigon. En lia posteno funkcios la anstataŭanto Helge Knudsen.

7. Datoj por estraraj interkonsiliĝoj dum la aŭtuno : 10/10, 7/11, 5/12

8. Eventualaĵoj

A, La estraro dankas al la klubo de Oslo pro la aranĝado de tre agrabla landa kongreso.

B, Dum la venonta interkonsiliĝo ni devos komenci la laboron por trovi lokon kaj aranĝonton por la landa kongreso en 2015.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 21:20

La venonta interkonsiliĝo okazos la 10-an de oktobro 2013

Raportis Mario Machlik.